



AVENO 13

oktobro 1995

Saluton,

ĉijare ni jam havis du bonajn renkontiĝojn de AVE-membroj kaj interesuloj. Mi tre dankas al ĉiuj, kiuj partoprenis je la renkontiĝoj kaj al tiuj kiuj tradukis la leteron al verdaj politikistoj en sian lingvon.

Mi tre dankas por donacoj, kiujn AVE ricevis. Kompreneble ili estas uzataj por celoj de AVE. La konto-eltiroj de la UEA-Konto "avex-z" servos kiel "kasa raporto". Se mono alvenas letere

al la sekretario - do al mi - mi uzos la monon por afranki kaj mencios en la afranko-kajero. Mi ricevis (por AVE) kelkajn Internaciajn Respond-Kuponojn, kiujn mi plidonis, se AVE demandis iun ajn.

Urĝe:

Rilate al la atom-provoj de la registaroj de Francio kaj Ĉinio AVE ankaŭ protestas.

En Parizo je 1a de septembro la pariza polico kaptis plurajn personojn, kiuj protestis kontraŭ la provoj. Inter ili J.F.Clet, esperantisto, kiu surhavis ĉemizon kun skribo: "Ĉinio, Francio, Haltigu la atomprovojn!". Li skribis, ke li estis kaptita dum pluraj horoj kun aliaj internaciaj protestantoj en metalan barilon (kaĝon) en la korto de la polica prefektejo. Bedaŭrinde ili ne parolis Esperanton. Estas bedaŭrinda afero, ke tiaj ŝtatestroj opinias, ke necesas montri sian forton tiel. Ili tute ne sentas sin respondecaj pri la saneco de venontaj generacioj de homoj kaj vivestaroj. Fioco. Bonvolu skribi vian opinion al: Jacques Chirac, President de la Republique Francais,

RENKONTIĜOJ - Parizo (1995-06-03):

Nia renkontiĝo okaze de la 2-a EU-Esperanto Kongreso sukcesis; partoprenis 29 membroj kaj interesuloj el Francio (15), Germanio (9), Britio (4) kaj Italio-Svisio (1); inter ili minimume 10 virinoj.

- La sekretario, do mi, donis la kaso-raporton, kiu montris dank' al kelkaj donacoj sufiĉan sumon por lui la ĉambrojn en Parizo kaj Tampere kaj por pagi la aliĝ-kostojn por esti fakasocio de UEA. Haveblaj estis VERDire, Gvidlinioj de la Federacio de Eŭropaj Verdaj Partioj (EFGP) kaj informiloj pri AVE. Sekvis ĝenerala raporto pri aktivecoj;
- Fakasocia kunlaboro kun UEA, SAT (komenco de kunlaboro), BEMI (biciklistoj), VEG (vegetaranoj), ETNA (kongreso pri Etnoj kaj Naturo), Karpata Media Asocio;
- krome kontaktoj al ne-esperantistaj organizoj: EFGP, Verdaj EP-Parlamentanoj, francaj Verduloj (A. Waechter, S. Vernex, Chr. Voynet), ICLEI (tutmonda asocio de komunumaj mediaj iniciativoj); la kontaktoj estis sen respondoj.
- Mi helpis al mediprotekta organizo "Naturprotekto kaj Mi" (Zinaida Ulaseviĉ k.a.) en Brest, Belarus, por ke Elisabeth Schroedter, MEP, povis partopreni je kongreso pri la Balta Hidroregiono; kaj vizitis ilin dumvoje al Tampere (en tiu ĉi kazo Esperanto almenaŭ helpis ricevi la unuajn kontaktojn).
- Kune kun Chr. Lavarenne mi verkis sciencan artikolon pri senarbarigo en Tibeto fare de la ĉina registaro kun malbonaj sekvoj eĉ por ĉinio mem -

Grave protestas AVE :

**Neniam plu atomaj eksplodoj,
eĉ ne en regionoj kiuj iel apartenas
al Francio aŭ al Ĉinio !**

Palais de l'Elysee, 55, rue du Faubourg-Saint-Honore, F-75008 PARIS. Je la 24a septembro, okazis internacia junulara manifestacio kontraŭ la atom-provoj; partoprenis pli ol 1.000 gejunuloj sur la reno-ponto inter Kehl (DE) kaj Strassburg (F); parolis Etienne Bassot, Bruselo, por FYEE (Federacio de Junaj Ekologistoj Eŭropaj), Niko Karcher, Kehl, por GAJ (Verd Alternativa Junularo (de Germanio)) kaj Rezzo Schlauch [reco ŝlaŭĥ] federacia parlamentano el Germanio. Krom la GAJ-anoj estis anoj de la franca "Ecolo J" kaj pluraj komitatanoj de FYEE el diversaj landoj.

la celo estis, ke tiu ĉi artikolo devus aperi en la ĉina ĵurnalo "Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj"; bedaŭrinde ĝis nun ĝi ne povis aperi. Almenaŭ ĝi aperis en VERDire 17.

- Ni parolis pri la situacio de la francaj Verda kaj Ekologia Partioj - kies disigo kaŭzis malsukceson je la eŭropa kaj aliaj balotoj. Kiel jam okazis en Germanio, temas pri direkto-batalo inter pli dekstra kaj pli maldekstra flanko kaj de unuopuloj - bedaŭrinde malgajnas la ekologio.
- Ni parolis pri ebla komuna laboro rilate al la protekto de besto-rajtoj; ekzemple, pro ĝia rilateco al pluraj landoj pri la kondiĉoj de longdaŭra transporto (eĉ kelkajn tagojn) de buĉotaj bovoj. Respondecas pri tiu temaro Anita Altherr kaj Ute Haas, se vi ŝatas kunlabori, bonvolu turni sin al ili.
- Informo de verdaj politikistoj, ĉefe en EU-landoj, pri la avantaĝoj de nia Internacia Lingvo. Ni diskutis uzi resumon de la prelego de C. Piron kiel bazo.
- Mi kunportis tekston en Esperanto por subteni la rezolucion kontraŭ Teraj Minoj (do, eksplodiloj kiuj damaĝas personojn kaj bestojn (kaj maŝinojn) eĉ kiam la milito jam finiĝis. Estas nun internacia movado (vidu la kunmetitan rezolucion - bonvolu subskribi kaj sendi al la UNHCR oficejo (vidu je la fino)). Bedaŭrinde la tempo forflugis tro rapide - mi demandis poste la membrojn de la kongresa podio; sed ili ne volis enmiksiĝi en la politikon (s-ro Cwik); kvankam laŭ mia kompreno temas pri agado en la kampo de la homaj rajtoj.

Tampere (1995-07-25):

Je nia renkontiĝo okaze de la 80-a Universala Esperanto Kongreso partoprenis 34 membroj/interesuloj, inter ili minimume 13 virinoj kaj 6 membroj de Verdaj Partioj; tie ni spertis ankaŭ bonan labor-etoson.

- Mi raportis pri la AVE-renkontiĝo en Parizo.
- Eĉ filmis dum kelkaj minutoj iu televid-stacio - ili poste intervjuis Maire Mullarney-n; mi ne scias, ĉu tio estis elsendita.
- Ni diskutis mallonge ĉu forta organizo de AVE necesus; kelkaj parolis kontraŭ - do, ŝajnas ke sufiĉas la inform-reto inter la AVEanoj kaj simpla sekretario sen prezidantoj ktp..
- Suplemente al la supraj temoj ni aŭdis kontribuojn de Nikolao Gudskov pri la nuna stato de la verda(j) partio(j) en Ruslando. Ankoraŭ ili estas iomete dise organizataj; ekzistas SEU (social-ekologia unio) kiu agas kiel tegmenta organizo por ĉiuj landoj de la Komune agantaj Sendependaj Ŝtatoj (angle: CIS).
- Krom la supraj temoj ni aŭdis raporton de Murodkul Rozikov el Samarkand pri la situacio de la Aral-regiono (vidu je Agad-eblecoj).
- Anita sendis intertempe la tutan tekston de la pariza parolado de Claude Piron (kopio estas havebla kontraŭ 2 irk-oj).

AVE Membreco kaj Agadeblecoj:

Nun AVE havas 137 membrojn el 28 landoj - bedaŭrinde mi ne scias la nombron de anoj de Verdaj Partioj, ĉar je antaŭaj tempoj ni ne demandis pri tio. Do, se vi iam skribos al la sekretario, bonvolu indiki:

- ĉu vi estas membro de iu Verda Partio kaj de kiu partio,
- viajn ĉefajn temojn (1-3 temoj),
- ĉu vi ŝatas aperi en la adres-listo - se vi ankoraŭ ne troviĝas en la kunmetita listo.
En la adres-listo estos viaj ĉefaj temoj kaj via organizo (se apartenas al via adreso).
- Ĝenerale dependas de la agademuloj, kio temo estos prilaborata. Ĝis nun ne ekzistas fakgrupoj, ĉar plejmulto de la AVE-membroj agas surloke - kaj pensas tutglobe. Se iu havas bonan agadon, li/ŝi povas peti pri kunlaborantoj rekte laŭ la adres-listo aŭ pere de informo en AVENO / VERDire.
- Aral-mar: Ekzistas 3-paĝa informilo pri la nuna situacio de la Aral-mar kaj eblecoj helpi pere de reto de Esperantistoj en la okcidento kaj en Centra

La letero al la verdaj politikistoj estis finverkata - post la renkontiĝo (kiu nur daŭris 1 horon pro la relative altaj kostoj !) - de Maire Mullarney, Gerard Pain kaj mi, la sekretario.

Intertempe ni havas jam multajn tradukojn en eŭro-etnajn lingvojn; forsenditaj ili estis en la germana kaj la angla al la membroj de la EU parlamento kaj al la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj; Kvitanĉis ĝis nun oficejo de Claudia Roth, MEP. AVE ja estas ne nur eŭropa organizo, sed tutmonda; do, se vi, membroj el aliaj kontinentoj, havas adresojn de aliaj verdaj partioj kaj politikistoj, ni volonte ankaŭ informos ilin - eble ni bezonos vian helpon je la konvena teksto.

> Post nia renkontiĝo Gerard Pain (F) proponis por la venonta jaro (1996) verdan postkongres(et)on post la UK en Prago (komence de aŭgusto) - povus ankaŭ esti en kadre aux post la SAT-kongreso en St.Petersburg (meze de julio ?), tio signifus antaŭ la UK. Alia ebleco estus en kadre de la somerkongreso de la francaj verduloj (ili ja antaŭ kelkaj jaroj akceptis Esperanton por internacia kunlaboro inter la verduloj) - La lasta havus la avantaĝon, ke organizo estus pli facila por ni. Mi petas vin pri viaj opinioj.

Azio. UEA petis, uzi la konton de AVE, ĝis aperos memstara Aral-grupo. Do, se vi ŝatas kontribui permono, bonvolu uzi la UEA-konton avex-z kun indiko "Aralo". Intertempe la Aral-fonduso pagis 250 gmk-oj por organizaj aferoj en Samarkand (vojaĝo de M. Rozikov al Tampere kaj por la oficejo de la "Muzeo de Paco kaj Solidareco" kio servas kiel "surloka" organizanto). Ni ekzemple povis plidoni gravan artikolon al Prof-ino G. Bahro de la Orient-Instituto en Hamburg. Por la estonteco ni volas helpi per rimedoj (medikamentoj) kaj instigoj aŭ informoj por pli daŭrigebla evoluo. Certe vi legis en la gazetaro pri la ĵus okazinta UN-kongreso en Nukus (ĉ. 160 km de la Aral-bordo) ke la maro aperos post 10 jaroj - mi esperas, ke ili ankaŭ serioze pritraktis la eblecojn, por plibonigi la ekologian situacion plibonigos. (Vidu la Aral-informilon).

- Besto-rajtoj: (kontakt-adresoj: s-ino Anita ALTHERR, Via Degli Olmi 23, I-34135 Triesto; s-ino Ute HAAS, Chamissostr. 7, D-40237 Düsseldorf) ili jam praktike aktivis en tiu agado.

* * * * *

Eŭropaj Verduloj en la EU-Parlamento:

Ni funebras pri Alexander Langer (kiu libervole eliris el la vivo), parlamentano el Italio - li laboris ege multe por la italaj kaj Eŭropaj Verduloj (Eksteraj Aferoj kaj Malarmado, krome lingvaj malplimultoj). Li iam skribis honore al Petra Kelly kaj Gert Bastian (okaze de ilia morto):

"Verŝajne estas tro malfacile por unuopulo iĝi portanto de espero: tro multaj ekspektoj, kiujn oni sentas kuŝi sur si, tro multnombraj la pliiĝantaj nesufiĉecoj kaj disreviĝoj, tro sentebaj envio kaj ĵaluzo, tro granda la ŝarĝo de emo al homeco, sen solvebligi ion vere..."

Eŭropa Unio:

Laŭ noveldonita "Greenfax" (Julio '95) ekzistas kelkaj aktualaĵoj:

- Por la Maastricht-Reviziokonferenco 1996 la Verduloj povis enmeti tri proponojn:
 - 1 Komuna Ekstera kaj Sekureca Politiko (KESP) kiu postulas, ke kiel unua paŝo cele al konflikt-preventado EU starigu Civilan Eŭropan Pacokorpuson (CEPo), en kiu eĉ militservo-rifuzantoj povus servi; komence necesus trejni observantojn, perantojn kaj specialistojn por finigi konfliktojn.
 - 2 Aldono de "garantii" kaj "laŭ-leĝa" al la postulo por protekto je diskriminacio.
 - 3 La komuna agrarpolitiko havu tiujn celojn: ekologie kaj sociale sustenebla (daŭrigebla) agrikulturo same kiel daŭrigebla evoluo de la regionoj.
- Aleksander Langer⁺ parolis por civila eŭropa civitaneco surbaze de referendumo pri "Eŭropa Granda Ĉarto" kiun devus verki konstitucia kunveno.
- Trafiko, Trans-Eŭropaj Retoj (TER):
 - : La Verduloj uzas la koncepton de "Malakcelo", tio signifas, ke la plirapidigo de la trafiko havis la sekvon de kreskanta trafiko kun diversaj sekvoj: Ampleksigo de la surfaco de stratoj kaj de konsumo de fuelo kaj de resursoj; perdiĝo de laborlokoj, ĉar je la periferioj laboro kostas malpli. La ekologiaj kaj sociaj kostoj de la trafiko oni neniam kalkulis kaj la uzantoj ne pagas la bezonatan prezon. Vi ja scias, ke la prezo por fuelo ne havas en si ekvivalenton por la produktado de ĝi - je regajneblaj energioj tiuj prezoj estas pli veraj.
 - : Rilate al energi-reto la Verduloj (Paul Lannoye kaj Undine von Blottniz) postulis, pli bone evoluigi energi-produktadon je regiona bazo; la transporto de energio sekvas al granda energi-perdo kaj malhelpas energi-ŝparajn instalaĵojn.
 - : Rilate al trafiko la Verduloj sukcesis en la parlamento je rilato inter fervojo (ekologie malpli danĝeraj rimedoj) kaj strato de 40% kaj 25%, respektive. Krome oni planas ek de 1998 revizion de la TER-sistemo surbaze de ekologiaj datumoj. Almenaŭ oni favoris la rekonstruo de la fervojo-ponto super la Reno ce Brisaño (Breisach) - Kolmaro (Colmar), kiu gravas por la regiona evoluo.
 - : Bedaŭrinde la Verduloj ne sukcesis haltigi la grandegajn projektojn: ekz-e la aŭtostraton laŭ la Somport-valo trans la Pireneoj, kiu endanĝerigos la ursojn kaj aliajn sovaĝajn bestojn; same la kanaligon de naturecaj riveroj. Pri la kanaligoj (Rodano - Rejno (Francio), Elbo - Saalo (Germanio)) kiuj detruos flaŭron kaj faŭnon mi ne legis en la raporto.
- Agrarpolitiko:
 - La kamparanoj ricevu iomete pli altaj prezoj (je 1%) por la produktoj kun la celo subteni la ŝanĝon al ekologie daŭripova agrikulturo. La prezoj por la produktoj montru la social-ekologiajn kostojn de la produktado. La koncerna mono estas je dispono, ĉar kelkaj merkataj prezoj plialtiĝis.
- Virina Monda Konferenco:
 - Nel van Dijk protestis kontraŭ la ŝovo de la NRO-konferenco al netaŭga loko. La EU-parlamento akceptis la proponon de la Verduloj, ke la partopreno kaj la parolrajto estu garantiata por ĉiuj virinoj sen diskriminacio. Pri tio ĉi konferenco vi certe jam legis en via gazetararo. (Tute hazarde mi renkontis la belarusan NRO-grupon, inter ili Zinaida el Brest je ilia hejmenveturado, pere de ili mi ricevis kontakton al esperantistino en Minsk).
- Maraj aferoj:
 - : La kaptado de grandaj kaj malgrandaj balenoj estu malpermesata, ĉar tiuj estas jam endanĝerigataj pro flosretoj, kemia kaj radioaktiva poluo. Nun oni scias, ke la antaŭa kalkulado gvidis al tro alta nombro da malgrandaj balenoj - kaj sur tio bazo oni donis la kaptopermeson.
 - : Dank' al VerdPaco (Greenpeace), pluraj politikistoj kaj al la bojkoto la oleo-tankego "Brent Spar" ne estos simple submergigata; Shell finfine akceptis, ke tiom da danĝera rubo kaj tiom da ŝtalo oni devas pritrakti je la tero, por sendanĝerigi la rub-ŝlimojn kaj recikladi la ŝtalon. Pli poste VerdPaco konfesis, ke ili tro-kalkulis la oleo-reston; tamen la celo eviti tiajn submergiĝojn restas netuŝita.
- Ekster-EU-a Politiko:
 - : Rilate al Eks-Jugoslavio la Verduloj parte sukcesis rilate al restado de la help-trupoj; la rabitaj areoj oni lasu al la antaŭaj posedantoj kaj helpon por rekonstruo la EU nur donu al komunumoj kiuj akceptas kaj subtenas plur-etnismon (tion ankaŭ substrekis ekz-e la urbestro de Tuzla, Selim Beslagic). Post kiam mi ricevis tiun informojn multe ŝanĝis tie pro la pli akra atako de NATO por protekti la loĝantaro de Sarajevo. Nuntempe komencis granda diskuto ekz-e inter la germanaj Verduloj rilate al paco - malperforto kaj milita defendo de afliktita loĝantaro.
 - : Wilfried Telkaemper (W.T.) kondamnis, ke la Tamilaj Tigroj en Sri-Lanko denove batalis kaj tiel malhelpis la pacon por la tamiloj.
- Homaj Rajtoj:
 - : La dekstra plimulto de la EP malakceptis la raporton pri homaj rajtoj en la EU de Edward Newman (Labour). Claudia Roth deklaris, ke ne eblas kondamni malrespekton de homaj rajtoj en diversaj landoj, se en EU problemoj kiel rasismo, malriĉeco kaj aliaj diskriminacioj ne estus pritraktataj en akordo kun la Homaj Rajtoj de UN.

- : Sklaveca laboro de infanoj en Pakistano diskutis W.T. - varmarko por tapiŝoj kiuj ne estas produktitaj de infanoj kaj justa ekonomia politiko necesus por protekti la infanojn.
- : En Eŭropa Lernejo I en Bruselo handikapita infano estis diskriminaciita - la Verduloj postulas, ke lernejoj havu la eblecojn teni handikapitajn infanojn.
- : Ekvatora Gvineo ((W.T.) subpremo de opoziciuloj).
- : Algerio ((Edith Mueller) endanĝerigataj virinoj ricevu asilon; postulo por homaj rajtoj).

- Diversaj aferoj:
 - : EU subtenu la pacon en la Proksima Oriento (el vidpunkto de Eŭropo);
 - : Kino-produktado en EU; MERCOSUR (kelkaj punktoj (merkato de virinoj kaj infanoj, drogoj kaj homaj organoj) estis akceptitaj, tamen mankas substreko de bazaj sociaj kaj ekologiaj standardoj); Plutonia-kontrabandado; nesekuraj vojoj de ŝipoj devus esti malpermesataj kaj oni ne malhelpu la ŝipveturigistojn por ke ili ne "elflagigu" la ŝipojn.

Federacio de Eŭropaj Verdaj Partioj:

- Anne de Boer nun estas la provizora ĝenerala sekretario. Leo Cox, ĝenerala sekretario ek de la komenco (laŭ mia scio) forlasis la belgajn Verdulojn al la Kristdemokratojn -
- Aŭskultado pri la Registara Konferenco '96 estis en Bruselo kune kun la Verda EP-frakcio. Rezulto anglalingva de la "Hearing" (Auskultado) estas havebla je Koordination Europapolitik der Bundestagsfraktion, Bundeshaus HT 212, DE-53113 BONN, Tel.: +228-1648918.
- Konsilio okazis meze de Junio en Budapeŝto, oni diskutis pri la sama temo.

- altigi la prezojn por primaraj resursoj (kiel oleo, ..) por ke oni uzu ilin pli saĝe;
- subteni la evoluon de uzado de regajneblaj resursoj (reciklado, sundevenaj energifontoj);
- redukti la malrektajn kostojn de laboristoj (kun la celo, ke senlaboreco malkresku).

La plejmulto de la industriestroj malŝatas tiun ideon; ili nur akceptos tiajn impostojn se ili estas samaj je tutgloba nivelo. Mi opinias, ke ekz-e UN povus ricevi bazajn financajn rimedojn el tutgloba imposto al aviadila fuelo.

La Verduloj (parte la Social-demokratoj) opinias, ke enkonduko de eko-impostoj jam nun je malgrandskala komenco kaj antaŭvidebla kreskado donus la avantaĝon de avangardo: evoluo de energi-ŝparaj teknikoj. Krome redukto de energi-importoj altigos la memstarecon.

Eko-Impostoj:

Certe ne nur en Germanio oni diskutas pri la Eko-Impostoj. En la Gvidlinioj de la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj ili estas akceptitaj kun tri celoj:

Teraj Minoj:

En oktobro estos UN-konferenco en Vieno kiu pri-traktos ankaŭ la terajn minojn - tiuj estas la eksplodiloj kiujn oni metas amase en la grundon kiel barilo kontraŭ la malamiko. Nun en pluraj landoj ekzistas iniciativoj, kiuj volas malpermesi la produktadon kaj vendadon de teraj minoj. Kontraŭe necesas ĉ. miliardo(j) por maldanĝerigi la jam metitajn terajn minojn. La belga kaj la franca registaroj malpermesis antaŭ nelonge la produktadon kaj vendadon de teraj minoj. Tamen ankoraŭ multaj ŝtatoj ne agas tiom respondece; ekz-e en Germanio la registaro - kaj tio ĉiam signifas "la militara-industria komplekso" - diskutas pri parta permeso. Tio signifus, ke ili volas permesigon de minojn kontraŭ tankoj kaj novajn minojn, kiujn oni post la milito povas detrui pere de telefunkciigo.

Mi almetas tekston de "medico international". Mi petas vin, kolekti plurajn subskribojn kaj sendi ilin al la UNHCR en Genevo.*

"Mi subtenas la Internacian Kampanjon Malpermesi Terajn Minojn kaj postulas:

- Malpermeso de evoluo, produktado eksporto kaj apliko de teraj minoj;
- Publikigo de la nuna stato (esploroj kaj stokoj);
- Detruo de la ekzistantaj teraj minoj;
- Uzado de la planitaj financaj rimedoj por
- Rehabilitado kaj subteno de viktimoj pro teraj minoj;
- Tutmonda sendanĝerigo de jam aplikitaj teraj minoj.

Jen sekvas kelkaj internaciaj adresoj:

Jody Williams, Coordinator Vietnam Veterans of America Foundation, 1347 Upper Dummerston Rd., BRATTLEBORO, VT 05301 (USA), Tel: + (802) 254-8807, e-mail: jwlandmines@igc.apc.org

Handicap International, ERAC 14 Ave. Berthelot, F-69361 LYON Cedex 07, Tel: + (33) 78697979

Mines Advisory Group, 54a Main Street, COCKERMOUTH, Cumb. CA13 9LU, (UK), +44 900 828580

Medico International, Obermainanlage 7, DE-60314 FRANKFURT, + (49) 69 244 380

ADEMO, Rua dos Pioneiros 415/A, Bairro do Aeroporto, MAPUTO, Mozambique, Tel: +258-46 53 69

UNHCR, Landmines Advisor, Case Postale 2500, CH-1211 GENEVA 2 Depot, Tel: + (41) 22 739 8658

Asocio de Verduloj Esperantistaj, UEA-konto: avex-z; Sekretario: Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, DE 79194 GUNDELFINGEN; e-poŝto (16 kB): Till_Westermayer@fr.maus.de

Atentu: se vi ne volas ricevi AVENOn, bonvolu informi min - por ne malŝpari resursojn.

Bonvolu uzi la kunmetitan folion kaj bv. eble subteni la kampanjon per subskribo(j).

* (Ni ricevis ĉ. 30 subskr. je la AVE - renkontiĝo kaj dank'al Mark Fettes (UEA) pliajn 22)